

þý Lingvo rimedo am resurso?

Lindstedt, Jouko

Universala Esperanto-Asocio  
2010

---

þý Lindstedt , J 2010 , Lingvo rimedo am resurso? in D Blanke & U Lins  
kune : Festlibro por Humphrey Tonkin . Universala Esperanto-Asocio , Rotterdam , pp.  
þý 51 62 .

---

<http://hdl.handle.net/10138/24950>

---

*Downloaded from Helda, University of Helsinki institutional repository.*

*This is an electronic reprint of the original article.*

*This reprint may differ from the original in pagination and typographic detail.*

*Please cite the original version.*

## Lingvo – rimedo aŭ resurso?

### Resumo

La artikolo pritraktas du metaforojn pri lingvo en socio: lingvo povas esti *rimedo*, kiun ĉiu ajn povas ekhavi kaj uzi, aŭ *resurso*, kies uzadon regas kaj limigas ĝiaj unuavicaĵaj posedantoj. La internacia angla estas prezentata kiel praktika rimedo, sed ĝi montriĝas esti resurso, kiu dependas de la denaskaj parolantoj kaj alportas ekonomian profiton al tiuj. Esperanton kiel lingvan resurson karakterizas kelkaj paradoksoj: nenies gepatra lingvo, kiu tamen havas denaskajn parolantojn; facila lingvo, kiun multaj esperantistoj neniam lernas flue paroli; neŭtrala internacia lingvo kun okcident-eŭropa leksiko kaj eŭropeca gramatiko; politike neŭtrala movado, kiu tamen defendas pacon kaj la bazajn homajn rajtojn; internacia literaturo, en kiu prosperas verkoj kun fono loka kaj individua. Sed kvankam Esperanto havas eŭropan fonon, ĝi ebligas ankaŭ al neeŭropanoj partopreni en la posedo kaj renovigo de la internacia lingvoresurso, sen monopolo de denaskaj parolantoj.

### 1 Du metaforoj pri lingvo en socio

Antaŭ niaj okuloj ruliĝas du fortaj evolutendencoj, kiuj ŝanĝas la socian pozicion de la lingvoj en drasta maniero spertita neniam pli frue. Unu estas la rapidiĝanta mortado de malgrandaj lingvoj – sorto, kiu dum tiu ĉi jarcento minacos kaj eventuale trafos la grandan plimulton de la homa lingvaro. La alia estas la daŭra disvastiĝado de la angla lingvo, kiu promesas al la tuta homa gento la unuan *lingua franca*-n konatan pli-malpli ĉie, aŭ por uzi nian tradician esprimon, ĝeneralan interlingvon. Inter la du procezoj ne troviĝas rekta kaŭza ligo, krom en tiuj landoj, kie la angla kiel la oficiala aŭ superrega lingvo efektive forpuŝas aliajn lingvojn. Sed ambaŭ tendencoj estas rezultoj de la samaj sociaj ŝanĝoj: la tutmondiĝo de la ekonomio kaj la kultura intermiksiĝo, kelkfoje nomata monda kultura kreoliĝo.

La lingvo havas en ĉiu homa socio pozicion, kiun neniu alia sistemo aŭ institucio povas transpreni. Sed por kompreni ĝian rolon, ni ofte parolas pri ĝi pere de metaforoj, kiuj similigas ĝin jen al iuj, jen al aliaj sistemoj. Kaj kiel kelkaj lingvistoj atentigas nin, la metaforoj uzataj por praparoli iun fenomenon povas influi nin ne nur proponante utilajn komparojn, sed altrudante certajn manierojn vidi la realon. Mi asertas, ke rilate la lingvon ekzistas grava diferenco inter la metaforo de *rimedo* kaj la metaforo de *resurso*. La diferenco povas ŝajni malgranda, sed en ĉi tiu eseo mi provos montri, ke efektive temas pri du malsamaj manieroj vidi la realon, kaj ke unu kondukas nin al malsimilaj konkludoj ol la alia.

La prototipo de rimedo estas laborilo, ekzemple martelo aŭ hakilo. Oni povas fari aŭ aĉeti tian, poste plene ĝin posedi, libere uzi ĝin. Ĝi iom post iom triviĝas pro la uzado, sed ne konsumiĝas: kvankam ĝi fine devas esti anstataŭigita per pli nova, dum la ĉiutaga uzo oni ne rimarkas rapidajn ŝanĝojn en ĝi. Ankaŭ pli komplikaj aparatoj kaj maŝinoj, ekzemple aŭtomobilo aŭ aviadilo, estas rimedoj ĉi-sence.

Tia rimedo estas por ni la denaska lingvo, kaj se tiu ne sufiĉas por ĉiuj uzoj – kion la parolantoj de la granda plimulto de la lingvoj rapide rimarkas en la nuna mondo – eblas alproprigi al si novajn rimedojn lernante pliajn lingvojn. La plej multuza rimedo estas la angla, kiun ĉiam indas lerni por avanci en la socio. La homoj estas malegalaj, ĉar iuj jam denaske posedas pli valorajn rimedojn ol aliaj, sed ĉi tiuj malavantaĝuloj almenaŭ rajtas lerni kaj poste uzi la rimedojn de tiuj avantaĝuloj. Aŭ tiel la metaforo almenaŭ prezentas la realon.

La prototipo de resurso estas kulturebla tero. Tutmonde gravaj resursoj estas ankaŭ ekzemple trinkebla akvo, nafto, diversaj ercoj, lignodonaj arbaroj. Resurson oni ne povas fari, sed oni povas ĝin posedi, kaj la posedanto regas, limigas aŭ obstaklas ĝian uzon fare de aliaj. Resurso ĉiam konsumiĝas en uzo, sed diversaj resursoj tre diferencas inter si rilate tion, ĉu ili renoviĝas aŭ ne: agro ĝustamaniere kulturata povas doni rikoltojn jaron post jaro, sed nafto ne reaperas en la loko, de kie oni ĝin unufoje elpumpis.

La lingvo estas resurso tiusence, ke ĝi ne estas arte farebla. (Esperanto, pritraktota poste en tiu ĉi eseo, povas esti escepto, sed kiel tia ĝi nur konfirmus la regulon<sup>1</sup>.) Lernante fremdan lingvon, ni tamen ne fariĝas ties posedantoj: ĝin posedas la komunumo de la denaskaj parolantoj, kiu sole kaj suverene decidas, kia estas ĝia normo kaj kia estas ĝia prestiĝa variaĵo. Ni povas do uzi nur onon de la resurso, kaj ni pagas por ĝi al la posedantoj de la resurso: ni aĉetas lernomaterialon kaj fakan literaturon tiulingvan, ni salajras lingvoinstruistojn – la denaskuloj ja estas la plej aprezataj –, interpretistojn, tradukistojn kaj lingvokontrolantojn. Eĉ per granda pago ni tamen ne akiras la plenan posedon de la resurso.

Ĉu la lingvo do ankaŭ konsumiĝas kiel aliaj resursoj kaj bezonas renovigon? Unuavide tio povas ŝajni surpriza ideo, sed ni rimarku, ke la lingvo ne vivas ekster siaj parolantoj, kaj tiuj ja havas limigitan vivdaŭron. Se la parolkomunumo ne renovigas sin, ankaŭ la lingvo formortas. La transdono el de unu generacio al la sekva estas la renoviga procezo de la lingvo, kaj tiu procezo estas regata de la posedantoj, la denaskaj parolantoj. Kiom ajn ekzemple la angla disvastiĝas inter parolantoj ne-denaskaj, tiuj ne povas transdoni la lingvon en iu el ties prestiĝaj, plej ĝustaj variaĵoj al siaj idoj sen la helpo de denaskuloj.

La bazo de la homa lingvo estas natura, ĉar ĝi estas biologie determinata en maniero kiun ni ankoraŭ ne plene komprenas. Sed la strukturo de ĉiu unuopa lingvo formiĝis en la socia historio de ĝia parolantaro, kaj la posedo de tiu aŭ alia konkreta lingvo aŭ ĝia certa variaĵo estas resurso socia. Kelkaj socilingvistoj distingas tri manierojn rilati al minoritata lingvo: ĝi povas esti rigardata *problemo* (ĉar ĝi malhelpas la glatan funkcion de la socio), *rajto* (kiam ĝiaj parolantoj rajtas utiligi kaj disvolvi ĝin, kvankam ĝi ne estas rekte utila por la socio) aŭ fine *resurso* (kiu aldonas ion pozitivan al la tuta resursaro de la socio). La konsidero de ĉiuj lingvoj, ankaŭ la plej malgrandaj, kiel pozitivaj resursoj por la socio estas unu el la ĉefaj pensolinioj en la fundamenta verko pri lingvaj rajtoj fare de Tove Skutnabb-Kangas (2000: 610 kaj aliloke); ŝi transprenis la tridividon *problemo – rajto – resurso* el de Richard Ruiz (1984). Por la malgrandaj lingvoj la metaforo de resurso havas do ankaŭ pozitivan, emancipan forton, dum kaze de la grandaj prestiĝaj lingvoj la sama metaforo malkaŝas la socian malegalecon kaŭzitan de ili.

## 2 La angla kiel rimedo kaj resurso

Abundas artikoloj kaj libroj, kiuj prezentas la anglan lingvon kiel utilan kaj benplenan rimedon por la homaro. La kvintesencon de tia argumentado oni povas trovi en la libro “La angla kiel tutmonda lingvo” (*English as a Global Language*) de David Crystal (1997), kiu per helaj koloroj pripentras la baldaŭan triumfon de la angla. Pli sombra estas nur la ultimato, kiun li vidas en la historia disvolvo: povas esti, ke la ŝanco ekhavi universalan interlingvon prezentiĝas nur unufoje en la homa historio, kaj se oni nun ne elektas la anglan, dua ŝanco eble neniam venos (p. 22-23). Crystal estas efektive multe pli triumfema ol David Graddol (1997, 2006) en siaj raportoj pri la estonteco de la angla. Laŭ Crystal (p. 18-19) oni uzos

<sup>1</sup> La proverbo “Escepto konfirmas la regulon” estas ofte miskomprenata tiel, ke regulo estas pruvebla per esceptoj – tio ja absurde konkludigus, ke la plej certa regulo estas tiu kun la plej multaj esceptoj, tio estas, la regulo kiu validas neniel! La proverbo male signifas, ke unuopa escepto *vidigas* al ni la regulon: rekonante iun kazon kiel esceptan, ni rimarkas, kio estas malescepta.

la anglan por esti komprenata, la aliajn lingvojn – al kiuj li principe rilatas pozitive – por montri sian apartenon kaj identecon. Graddol, male, antaŭvidas ankoraŭ relative gravajn komunikajn funkciojn ankaŭ por kelkaj aliaj lingvoj ol la angla dum la 21-a jarcento.

La implicita metaforo en la argumentado de Crystal, kaj amaso da similaj libroj kaj artikoloj, estas tiu de rimedo: la angla estas valora ilo, kiun oni povas ekuzi lernante la lingvon. Tio ne estas tre facila, sed feliĉe la metodoj de la lingvoinstruado konstante pliboniĝas, laŭ li. Malmulte pritraktata estas la demando, ĉu la denaskaj parolantoj de la angla havas ian avantaĝon. Crystal dediĉas al la demando iom pli ol unu paĝon el sia libro, sub la titolo “lingva potenco” (p.14-15). Li koncedas, ke ekzistas “anekdotaj atestaĵoj” indikantaj, ke la denaskaj parolantoj havas avantaĝon en diversaj organizaĵoj kaj sociaj situacioj, sed: “Se oni sufiĉe atentis la demandon de lingvolernado, la problemo de malavantaĝo draste malgrandiĝas.” Se la estontaj generacioj estos aŭtente dulingvaj, kun la angla ĉiam kiel unu el la du lingvoj, “la argumento pri elitismo forvaporiĝos”.

En sia triumfemo Crystal efektive plektas duoble naivan argumenton. Se la dulingveco de la estontaj infanoj vere estos pli-malpli kompleta, tiam ili ja ne nur similos kaj egalos al denaskaj parolantoj de la angla, sed estos rekte rigardataj kiel tiaj. La avantaĝo de la denaskuloj ne malaperos, sed simple ilia rondo plivastiĝos. La esenca demando estos tiam, kiel longe tiaj dulingvaj grupoj faros al si la penon resti dulingvaj kaj konservi siajn “identecajn” lingvojn, kies transvivon Crystal pie deziras. Antaŭvideble la fina rezulto estos nur pli da unulingvaj denaskuloj, kaj minaco al la ekzisto mem de aliaj lingvoj. Ne ĉiuj tion bedaŭros, sed ĝuste tial Crystal, kiu en alia libro sia (2000) avertas pri la formorto de la malgrandaj lingvoj, devus alfronti la problemon pli honeste.

La alia naivaĵo en la argumento de Crystal estas lia kredo, ke pere de lingvoinstruado oni povas, aŭ iam povos, krei kvazaŭ-denaskan lingvan kompetenton pri la angla ĉe amasoj de parolantoj de aliaj lingvoj. Konfesinde, estas malfacile diskuti pri tio, kio estos ebla aŭ malebla en fora estonteco, sed ŝajnas al mi, ke la promeso de ĉiam pli efika lingvoinstruado tre similas al la iama promeso, neniam vere realiĝinta, de ĉiam pli efika aŭtomata tradukado kiel la solvo de la lingvo-problemoj. Kvazaŭ en scienca fikcio, Crystal eĉ antaŭvidas ke “post 500 jaroj” la angla estos konatigata al ĉiu homo ne nur ekde la naskiĝo, sed eĉ ekde la koncipado (p. 139)<sup>2</sup>.

La naivan optimismon de Crystal oni devas konfronti kun la ĉiutaga vivsperto de ĉiuj ne-denaskaj parolantoj de la angla, kiuj pro siaj studado, profesio aŭ aliaj kaŭzoj devas uzi tiun lingvon en relative postula nivelo. Se konsideri la medion, kun kiu Crystal verŝajne plej multe rilatas, nome tiun de universitatoj kaj universitataĵoj, liaj kolegoj el aliaj landoj povus facile rakonti al li, ke eĉ tiuj el ili, kiuj povas pli-malpli libere prelegi pri sia fako en la angla, ne povas publikigi siajn studojn en sciencaj revuoj aŭ en la reto sen antaŭa kontrolo fare de denaskaj parolantoj. En la libera diskutado de la sciencaj konferencoj la plimulton de la tempo uzas denaskaj parolantoj de la angla aŭ tiuj sciencistoj, kiuj longe studis kaj laboris en landoj anglalingvaj. Se iu universitato publikigas en la angla prospektojn kaj revuojn por konkuri pri talentaj eksterlandaj studentoj kaj esploristoj, tre gravas kontroli ĉiujn tekstojn ĉe denaskaj parolantoj por ke la universitato ne perdu sian kredindecon. Multe da spertoj pri la malavantaĝa pozicio de la nendenaskaj parolantoj de la angla en diversaj situacioj de internacia kunlaboro kolektis Claude Piron (1994, precipe p.73-94). Robert Phillipson (2004) pritraktis la demandon pri lingve justa komunikado i.a. en la kvara ĉapitro de sia libro *Ĉu nur-angla Eŭropo?*

<sup>2</sup> Mi montris al miaj infanoj futurologian artikolon, kiun mi eltondis el populara revuo en 1968: inter la aliaj mirindaj atendeblaj en 2000, ĝi promesis, ke tiam (do, nun) la infanoj lernos ĉiujn lingvojn bezonatajn ĝis sia sepjariĝo, danke al la pli efikaj instruteknikoj. Efektive, la nuna mondo estas multe pli simila al tiu de la jaro 1968, ol la artikolo antaŭvidis...

La kruda kaj simpla realo ĉiam refoje montras, ke la angla lingvo de parolantoj nedenskaj ne havas la kvaliton kaj prestiĝon, kiu igus ĝin uzebla samnivele kun la vera angla lingvo – tiu de denaskaj parolantoj, marĝene ankaŭ tiu de homoj studintaj longan tempon en medio anglalingva. La angla estas ne rimedo alproprigebla, sed resurso posedata kaj kontrolata de la parolantoj denaskaj. La anglalingvaj landoj ekonomie profitegas per lernomaterialoj kaj vortaroj, per lingvokursoj, per eksportado de instruistoj, tradukistoj kaj lingvokontrolistoj. La registaroj de Anglalingvujo certe konscias pri tiu granda avantaĝo, same kiel pri alia: la nebezono mem uzi lerneajn rimedojn kaj tempon por instrui fremdajn lingvojn.

Diversaj studoj kaj aliaj publikaĵoj, prezentantaj la anglan kiel la universalan interlingvon apartenantan al ĉiuj, ne nur al la denaskuloj, estas parte bonintencaj – iuj esploristoj deziras, ke tiel estu en mondo pli bona kaj demokratia. Sed objektive tia maniero prezenti la aferon nur kamuflas la fakton, ke ĉiam estas pli bone kaj profitdone klopodi por imiti la denaskajn parolantojn ol observi ian normon de nedifinita “tutmonda angla”. La emancipo de la parolanto nedenskaj estas celo principe aprobinda, sed la neado de la realaj potencrilatoj servas nur al ties renovigado.

Verŝajne granda plimulto de la diversgradaj instruistoj pri la angla tamen konscias pri la diferenco inter rimedo kaj resurso, kvankam ili kompreneble ne uzus ĝuste tiujn terminojn. Ili instruas la anglan nur kiel rimedon, kiel la plej uzeblan internacian komunikilon kaj kiel la ŝlosilon de la plej granda kaj grava fakliteraturo en la mondo. Ili ne kaŝas la fakton, ke la normon de la senerara lingvo decidas la denaskaj parolantoj, kies kompetenton povas akiri neniu loĝanta ekster la kerna Anglalingvujo, kiu regas la resurson. Eĉ la universitataj fakoj pri angla filologio ne pretendas instrui ian “tutmondan anglan”, sed la britan kaj usonan normojn, nek ian tutmondan literaturon, sed la literaturon de Chaucer, Ŝekspiro kaj iliaj posteuloj... eble kun unu-du libervolaj kursoj pri barata kaj aliaj marĝenaj literaturoj.

Same, la lingvolernantoj mem estas certe pli realismaj ol Crystal kaj aliaj proponantoj de la ĥimero de la “tutmonda angla”. Ili lernas la anglan por pasive kompreni ĉion eldonatan kaj elsendatan en la angla, kaj por aktive uzi ĝin kiel helplingvon en diversaj neoficialaj situacioj kun alilandanoj. Ili scias, ke ĝi estas ne ilia lingvo, ili ne aspiras fariĝi eseistoj aŭ verkistoj skribantaj en ĝi. Ili provas lerni kaj alproprigi modajn esprimojn aŭ trafikajn slangaĵojn, sed ili ne mem kreas tiajn. Ili scias, ke por vere regi la anglan, oni devus studi kaj labori en ĝi dum multaj jaroj, kaj almenaŭ en iuj eŭropaj landoj pli kaj pli granda parto de la gejunuloj ne rigardus granda katastrofo, se la angla estus la sola gepatra lingvo de la venontaj generacioj en ilia lando. Ni povas malkonsenti kun tia sinteno, sed almenaŭ ni devas konfesi, ke ĝi baziĝas sur multe pli realisma bildo de la mondaj potencrilatoj ol la publikaĵoj pri la “tutmonda angla” kun “nedenskaj variaĵoj”.

### **3 Esperanto – nenies lingvo kaj kulturo, ĉies lingvo kaj kulturo**

La plej grava alternativo por la angla kiel internacia lingvo estas Esperanto – ne pro siaj disvastigiteco, konateco aŭ ekonomia forto, ĉar tiurilate Esperanto certe estas komplete neglektebla, sed pro tio, ke ĝi prezentas tute alian manieron aliri kaj solvi la problemon de interlingva komunikado. Ekzemple la franca aŭ araba ne povas esti alternativoj por la angla en tiel radikala senco, sed eventuale nur kompletigaĵoj.

Kiel konate, multaj elstaraj figuroj en la internacia Esperanto-movado estas denaskaj anglalingvanoj – nia jubileulo Humphrey Tonkin estas brila ekzemplo de tio. Ankaŭ alilingvaj esperantistoj ordinare scipovas la anglan almenaŭ tiel bone, kiel iliaj samlandanoj en komparebla socia pozicio, kaj ne hezitas ĝin uzi se bezonate (eĉ se ili ofte ne partoprenas la nekritikemon kaj entuziasmon de siaj kolegoj pri tiu lingvo). Kvankam Esperanto estas en la principa nivelo alternativo por la angla, por la individuo ĝi rolas kiel kompletigaĵo. Kiam

Esperanto do funkcias kiel rimedo, kiam kiel resurso? Kiu posedas ĝin, ĉar al ĝi mankas komunumo de denaskaj parolantoj?

Laŭ la centjariĝinta Bulonja Deklaracio: “La esperantismo estas penado disvastigi en la tuta mondo la uzadon de lingvo neŭtrale homa” (Zamenhof 1990: 1518). Dum por la ekstera mondo la ĉefa karakterizaĵo de Esperanto plu estas ĝia artefariteco, la esperantistoj mem diversmaniere disvolvis la karakterizaĵon “neŭtrale homa”. Ĝi povas ricevi interpretojn negativan: Esperanto estas justa komunikilo, ĉar ĝi estas nenies propra lingvo – kaj pozitivan: Esperanto estas egale alirebla por ĉiuj. La socia kaj kultura valoro de Esperanto fundamente dependas de tio, ĉu “nenies lingvo kaj kulturo” estas, aŭ almenaŭ povos fariĝi, “ĉies lingvo kaj kulturo” – kie “ĉies” signifas ne nepre “de ĉiuj homoj en la mondo”, sed almenaŭ “de ĉiu deziranto, sendepende de la deveno”. Humphrey Tonkin (2006) multflanke kaj pensige pritraktis la demandaron en sia verko *Lingvo kaj popolo*.

La fundamenta duobleco “nenies lingvo kaj ĉies lingvo” prilumas kaj klarigas kelkajn fundamentajn trajtojn, unuavide paradoksajn, en la Esperantaj lingvo kaj kulturo:

*a. Nenies gepatra lingvo, kiu tamen havas denaskajn parolantojn.* Esperanto verŝajne ne havis denaskajn parolantojn en la tempo de la Bulonja Deklaracio, sed tiaj aperis baldaŭ poste (Corsetti 1996: 264-265). Ĉu la denaskuloj do havas avantaĝon en la lingvokomunumo pro sia pli alta lingva kompetento? Ĝis nun tia fenomeno ne estis observebla. Por granda parto de la denaskuloj Esperanto, kvankam alproprigita en frua infanaĝo samtempe kun la etna(j) lingvo(j) – aŭ esceptokaze eĉ antaŭ la etna(j) lingvo(j) – en la plenkreskula aĝo iĝas tamen lingvo duagrada, regata en malpli alta nivelo ol la aliaj lingvoj posedataj. Tion kaŭzas la fakto, ke la lingvokomunumo estas diaspora, kaj mankas okazoj uzi la lingvon regule en diversaj situacioj ekster la familio. Iuj lingvistoj opinias, ke Esperanto entute ne havas denaskajn parolantojn en la socilingvistika senco de la vorto, ĉar ili ne formis kompaktan lingvokomunumon.

Inter la plej fluaj parolantoj ja troviĝas denaskuloj, sed ili ne formas apartan elitajn grupon. Evidente ankaŭ nedendaskuloj povas en Esperanto atingi la saman nivelon de lingva kompetento kiel la denaskuloj, almenaŭ se ni konsideras nur la eksterajn indikaĵojn de la kompetento kaj ne la lokalizon kaj reprezentigon de la lingvo en la cerbo (ĉi tiu demando estas ankoraŭ neesplorita). Tiu fakto estas ofte klarigata per la facileco de Esperanto, sed la klarigo estas ĝusta nur se oni konsideras ne nur la *strukturan* facilecon (la simplan strukturon de la gramatiko, produktivan vortfaran sistemon kaj similaĵojn) sed ankaŭ ion, kion oni povus nomi facileco *socia*: la variado inter diversaj esprimmanieroj ne estas limigata de la denaska parolantaro, kiu en aliaj lingvoj pro longa historia evoluo akumulis arbitrajn regulojn pri la ĝusta kaj malĝusta manieroj esprimi sin. Por uzi la ekzemplon de Claude Piron, kiu multe esploris la psikologian bazon de la simpleco kaj malsimpleco de lingvo, en Esperanto oni rajtas kaj *helpi iun* kaj *helpi al iu*, ĉar ambaŭ estas semantike pravigeblaj, dum la plej multaj eŭropaj lingvoj arbitre elektis aŭ la rektan aŭ nerektan objekton kiel la solan eblan ĉe la responda verbo.

Eĉ la esperantistoj mem ordinaro mencias nur la strukturan facilecon kiel avantaĝon de sia lingvo, sed povas esti ke la socia facileco, toleremo al variado en esprimmanieroj, estas almenaŭ egale grava fenomeno. Sed ankaŭ la socian facilecon oni ne povas absolutigi: se mi skribus kaj parolus Esperanton nur surbaze de la gramatikaj reguloj de la Fundamento kaj vortaro, sen spertoj pri la reala Esperanto uzata, mia lingvaĵo estus tamen rigardata stranga, erara kaj nacilingve influata. Por finno estus nature diri *forgesi ion en la butikon, lasi iun hejmen*, aŭ inverse, *trovi ion el la biblioteko*, dum en Esperanto oni ne konceptas forgesadon, lasadon aŭ trovadon kiel abstraktajn movojn – ĉi-kaze eblas diri nur *en la butikon, hejme, en*

la biblioteko. Evidente ankaŭ en Esperanto ne eblas ĉio, kio eblas en aliaj lingvoj, sed oni tamen ne bezonas esti denaskulo por pli-malpli komplete lerni, kio eblas kaj kio ne.

b. *Facila lingvo, kiun multaj esperantistoj neniam plene posedas kaj en kiu eĉ la plej spertaj de tempo al tempo eraras.* Malgraŭ la struktura kaj socia facilecoj de Esperanto, neniu el ĝiaj parolantoj produktas plene senerarajn parolaĵojn kaj tekstojn. De unu flanko, tiel ja devas esti, se Esperanto estas lingvo: ĉiu homa lingvo estas malsimpla sistemo de sistemoj, kaj tial ni de tempo al tempo eraras ankaŭ en niaj gepatraj lingvoj, dirante eĉ la malon de tio kion ni intencis diri. (Mi celas ne esprimojn, kiuj estas eraroj nur laŭ la norma, lerneja gramatiko, kvankam regule uzataj, sed erarojn, kiujn ankaŭ la parolanto mem emus tuj korekti, se tiu ilin rimarkus.) Laŭ proverbo, eĉ Homero iam preteratentis ion; kaj Zamenhof preteratentis ion en proverbo: la ero 1000.04 en lia *Proverbaro Esperanta*, “Malavarulo kaj porko estas bonaj post la morto” (anstataŭ “Avarulo...”), estas miso kaŭzita de tio, ke la plimulto de la *mal*-vortoj havas negativajn kromsignifojn<sup>3</sup>. Iuj lingvofilozofoj demandas, ĉu Zamenhof principe povis iam ajn erari en lingvo, kiun li mem kreis – sed li ja povis, kaj kelkfoje ankaŭ eraris. Li certe korektus la proverbon, se iu atentigus lin pri ĝi.

Sed, de alia flanko, oni povas legi kaj aŭdi amason da malbona kaj erara Esperanto ankaŭ pro tio, ke multaj esperantistoj neniam faras al si la penon sufiĉe lerni la lingvon. Ĉar por iuj el ili Esperanto estas unuavice ideo disvastigenda, kaj nur duavice lingvo kaj kulturo, ili povas laŭdi la facilecon de la lingvo scipovante diri en ĝi preskaŭ nenion (la tiel nomataj bonan-tagon-esperantistoj) aŭ eĉ traduki kaj ekverki beletron malgraŭ sia tre mankhava regado de la lingvo. Kvankam ekzemple la por-infana literaturo en Esperanto estas relative abunda por tiel malgranda lingvokomunumo, tiel ke vere eblas subteni la lingvolernadon de la denaskuloj per infanlibroj, tia libro, kiun gepatro povus simple voĉlegi al sia infano sen gramatikaj kaj vortaj korektoj, estas escepto. (Des pli ĝuindaj estas la porinfanaj tradukoj fare de veraj majstroj, kiel Nora Caragea aŭ Sten Johansson.)

Oni povas sin demandi, kiom efektive utilas la facileco de Esperanto, se oni en ĝi publikigas librojn, kiuj estas lingve egale misaj kiel estus anglalingvaj libroj fare de nedenaskaj verkistoj. La relativa facileco de Esperanto estas parte nuligata pro la malgranda energio, kiun multaj dediĉas por lerni ĝin. Ĉu estas tabuo paroli pri ĉi tio en Esperantujo – ke Esperanto ne estas *tiom* facila? Plu restas aktualaj la vortoj de Zamenhof en la antaŭparolo de *Fundamenta Krestomatia* (1903): “tiu, kiu eldonas verkon en Esperanto, ne koniĝinte antaŭe fundamente kun la spirito kaj la modela stilo de tiu ĉi lingvo, alportas al nia afero ne utilon, sed rektan malutilon”.

Sed povas esti, ke ankaŭ la reguloj de bona Esperanto plistriktiĝis kun la tempo. Ja estas konate, ke ekzemple la tekstoj en *Fundamenta Krestomatia* ne plu taŭgas kiel lingvaj modeloj, sed estus korektitaj de iu ajn nuna redaktoro. Verŝajne la amplekso de la permesata variado en la sintakso, stilo kaj elparolo iom post iom malgrandiĝis dum la historio de Esperanto. Se tiel estas, la lingvo iurilate fariĝadas pli malfacila: por uzi ĝin ĝuste kaj konvinke, necesas lerni pli ol antaŭ kelkdek jaroj. Tiam ankaŭ pligraviĝas la demando, kiutipa rimedo kaj resurso Esperanto do estas; ĉu kaj kiel la potencrilatoj implicitaj en ĝi diferencas de tiuj implicitaj en la angla? Al ĉi tiu demando ni revenos ĉi-sube.

c. *Neŭtrala internacia lingvo kun okcident-eŭropa leksiko kaj eŭropeca gramatiko.* Oni ofte aŭdas la argumenton, ke pro siaj eŭropaj leksiko kaj gramatiko Esperanto ne estas reala alternativo por la angla. Kvankam la baza strukturo de Esperanto restis pli-malpli la sama,

<sup>3</sup> Mi vidis provojn interpreti la proverbon tiel, ke *malavarulo* estus ĝusta, sed kiel atentigus Boris Kolker en la reta diskutejo Bja-listo (1998), la franca modelo de la proverbo en la kolekto de la patro de Zamenhof estas *L'avare et les cochons ne sont bons qu'après leur mort*; similan proverbon konas ankaŭ la italoj. Do, sendube Zamenhof eraris.

ankaŭ ĉi tiu paradokso estas historie kondiĉita: dum la unuaj tempoj Esperanto male estis pli multe kritikata pro tio, ke ĝi tro kripligas kaj ŝanĝas la noblan modelon de la lingvoj okcident-eŭropaj, sed la posta ŝanĝiĝo en la konceptoj pri internacieco kaj tutmondeco dum la pasinta (20-a) jarcento prezentis la demandon en nova lumo. Al ĉi tiu grava demando ni revenos pli detale ĉi-sube en la kvara parto de tiu ĉi eseo (Kia resurso estas Esperanto?).

ĉ. *Politike neŭtrala movado, kiu tamen defendas pacon kaj la bazajn homajn rajtojn.* Tiu ĉi paradokso koncernas ne la lingvon kaj kulturon, sed la socian movadon por Esperanto. Oni povus demandi, kial ĉi tio entute bezonas aspekti paradokso: ja paco kaj homaj rajtoj estas principe universalaj valoroj, kial eviti ilin? Tamen, en la praktiko la plej reprezenta organizaĵo de la esperantistoj, Universala Esperanto-Asocio, en kies gvidantaro Humphrey Tonkin longe havis elstaran rolon, devis ripete deteni sin de tro konkretaj elpaŝoj por ne obstakli al la esperantistoj de tiu aŭ alia lando la aliron al la internacia movado. Tiel eblis gardi la unuecon de UEA dum la Malvarma Milito; kaj lastatempe lertan elekton (kaj eviton) de politika starpunkto postulis ekzemple la iraka milito – por multaj esperantistoj krimo kontraŭ la internacia juro, sed por aliaj rajtigita sindefendo – kaj precipe la Universala Kongreso en Ĉinio, lando kritikata pro siaj lezoj de homaj rajtoj.

Oni povus supozi, ke la defendo de la *lingvaj* homaj rajtoj estas tamen nedisigebla parto de la Esperanto-movado, kiu dum la lastaj jaroj sukcesis formi funkciajn kontaktojn kun tiaj konataj aktivuloj ĉi-kampaj kiel Skutnabb-Kangas kaj Phillipson. Sonas jam preskaŭ banale, kiam unu el la sukcesaj junaj kandidatoj en la komitataj elektoj de UEA diras en intervjuo: “etna kaj lingva diverseco estas beno de la homaro” (Ivanov 2004).

Sed, momenton: kiu diris, ke “la diverseco de lingvoj estas la sola, aŭ almenaŭ la ĉefa kaŭzo, kiu disigas la homan familion kaj dividas ĝin en malamikaj partoj”? Estis Zamenhof en sia fama letero al Nikolaj Borovko (Zamenhof 1990: 923). Ĉi tie li priskribas sian junaĝan konvinkon, sed ankaŭ poste li ne trovis la lingvan diversecon en si mem aparte valora. En sia vojmontra eseo “Esenco kaj estonteco de la ideo de lingvo internacia”<sup>4</sup> li neniel starigas unulingvan mondon kiel celon, sed tamen skribas (en sekcio 2): “Ni konfesas, ke kiom ajn ni rompis al ni la kapon, ni neniel povis kompreni, en kio nome konsistis la malfeliĉo por la homaro, se en unu bela tago montriĝus, ke ne ekzistas jam plu nacioj kaj lingvoj naciaj, sed ekzistas nur unu ĉiuhoma familio kun unu ĉiuhoma lingvo.” (Zamenhof 1990: 980-981) Rimarku tamen la esprimon “unu ĉiuhoma familio”: Zamenhof certe ne bonvenigus unulingvecon altruditan per ekonomia kaj politika potenco.

Efektive, kiam la esperantistoj, tradicie himnantaj pri “la muroj de miljaroj”, komencas rigardi la lingvan diversecon kiel pozitivan valoron, kaj Esperanton kiel esencan ilon por defendi ĝin, ili multon reinterpreteblas kaj redirektas en sia idearo – eĉ se oni povas pravigite argumenti, ke la bazo plu restas la konvinko de Zamenhof pri la egaleco de ĉiuj homaranoj. Kaj la redirektado ne estas sendolora. En la Universala Kongreso de Ateno en 1976 min konsternis la malamikeco, kun kiu kaj grekaj kaj bulgaraj esperantistoj rilatis al la lingvaj minoritatoj en siaj landoj – aŭ al la nura sugesto, ke tiaj minoritatoj povas ekzisti kaj havi iajn rajtojn. Ankoraŭ nun ne estas malfacile trovi esperantistojn, kiuj estas indiferentaj aŭ malamikaj kontraŭ la lingvaj minoritatoj en sia lando, aŭ kiuj opinias, ke la Esperanto-movado ne bezonas havi starpunkton pri tiaj malplimulto. Eĉ en la lingva kampo la ekvilibro inter neŭtraleco kaj homaj rajtoj estas do delikata demando.

d. *Internacia literaturo, en kiu prosperas verkoj kun fono loka kaj individua, kun enhavo konfesa, mem-analiza kaj eĉ ekshibicia.* Nia beletro, evidente, dividiĝas en la originalan kaj la tradukitan. Sed tio signifas ne tute saman aferon kiel en la etnolingvoj. La Esperanta

<sup>4</sup> Pri tiu eseo vd. la ĉi-libran kontribuon de Bavant.



tradukisto ja ordinare ekiras el sia gepatra lingvo, ne el la fremda, kiel okazas en aliaj tradukaj literaturoj; la Esperanta tradukisto do pli bone scias, kion la fontoteksto volas komuniki, sed poste ŝi/li avancis ne al la bone konata tereno de la patrujo, sed rekte al la pli ekscita kaj eĉ danĝera internacia tereno, kie multaj problemoj estas solvendaj preskaŭ ĉiupaŝe. Neniu konscias pli bone ol la tradukisto de beletro, ke Esperantujo estas nenies lando. Ĉu ankaŭ Humphrey Tonkin tion rimarkis, tradukante sian amatan Ŝekspiron? Sed fine subiĝas Esperanto, supla kaj por svedo kaj por ĉino – se ili montriĝas majstroj, kio ne ĉiam okazas.

Sed, surprize, kiam oni en Esperanto produktas originalan literaturon, sin montras lando aperta por elverŝo de intimaj sentoj. La Esperantaj romanoj ofte ne prezentas grandajn internaciajn temojn, sed tute male, personajn konfesojn kaj mem-analizojn. Ia flagŝipo de ĉi tiu tendenco en nia moderna literaturo estas *La Litomiŝla tombejo* de Karolo Piĉ, kies ĉefa merito estas ne en la eksperimenta lingvaĵo, sed en la kreo de sukcesa fikcia aŭtobiografio: la leganto profunde identiĝas kun la interna vivo de la rakontanto, tiel ke ne plu gravas, kiom la voĉo de la rakontanto estas tiu de Piĉ, kiom tiu de lia fikcia kreaĵo. Kvankam iom epigona al Piĉ, *Tarokoj kaj epokoj* de Christian Declerck estas pli klare romano de aŭtobiografia mem-analizo. Plej freŝe ventolas la angorojn de mezaĝa viro Sten Johansson en sia *Dis!*, kiu malgraŭ siaj humuro kaj memironio estas multe pli serioza kaj eĉ tragedia ol unuavide ŝajnas (kaj ol la recenzantoj rimarkis).

Virinaj aŭtoroj malkaŝas siajn sentojn en eĉ pli rekta stilo, kun malpli da vualoj. *Hetaĵro dancas* de Eli Urbanová ne domaĝas sian aŭtorinon nek lasas la leganton libera antaŭ la fino de la libro; *Ombro sur interna pejzaĝo* de Spomenka Ŝtimec estas sincera kiel persona taglibro, kvankam pli artisma. La tuta tendenco produktis eĉ jam sian inversigon en *La manto*, kiu malgraŭ sia deklarita virina aŭtoro Paula Mährti, ŝajniganta sin malbone kaŝita pseŭdonimo de bone konata esperantistino, estas efektive verko de viro... kiu per tiu truko ebligis al si morti en sia propra konfesolibro.

Ĉu okazas tiel, ke ĝuste la foreco de Esperanto ekster la ĉiutaga vivmedio de la verkistoj faciligis al ili fari intimajn konfesojn, ekshibicii sen inhiboj? Tiam oni klare vidas, kiel nenies kulturo fariĝas ĉies kulturo per ŝanĝo de perspektivo. Sed oni ne povas diri, ke la verkistoj venas en Esperantujon nur por elverŝi la galon kaj larmojn kolektitajn aliloke: en ĉiuj menciitaj romanoj rolas (kaj interesas legantojn) ankaŭ la konfliktoj kaj elreviĝoj de Esperantujo mem.

#### 4 Kies resurso estas Esperanto?

Por aproksimi la esencon de Esperanto, mi ĉi-punkte kondukas sur la scenejon Bernard Comrie, unu el la plej konataj ĝeneralaj lingvistoj nuntempaj. En artikolo malmulte konata (1996)<sup>5</sup>, li komparas “naturan” kaj “artefaritan” internaciajn lingvojn – ne surprize, ĝuste la anglan kaj Esperanton, kiel mi ĉi-supre. Post la Dua Mondmilito nur malmultaj lingvistoj komentis pri Esperanto, ĉu pro tio ke ili trovas ĝin neinteresa, ĉu pro tio ke ili antaŭvidas la troigitan kaj ĝenan intereson, kiun la esperantistoj, precipe tiuj ne konantaj lingvosciencan, montrus al ĉiu elpaŝo tiuspeca. Comrie do meritas laŭdon, ke li akceptis la penon kaj riskon konatiĝi kun Esperanto – ne malofte lingvistoj esprimas sian opinion pri ĝi surbaze de nur suprajaj scioj – kaj ke li poste konsideris ĝin kaj el struktura vidpunkto kaj kiel proponitan internacian lingvon.

Comrie povas tamen esti kritikata pro certa neprofesieco en parto de sia artikolo. Ĝia subtitolo estas “pritakso fare de tipologiisto”<sup>6</sup> – oni povus do kompreni, ke li celas pritaksi

<sup>5</sup> Mi dankas al Mark Fettes, kiu atentigis min pri la artikolo.

<sup>6</sup> En la originalo *a Typosogist's Assessment*, kio evidente estas preseraro por *a Typologist's...* Bedaŭrinde la artikolon plagas preseraroj!

antaŭ ĉio la gramatikon de Esperanto en la kadro de tio, kion ni nune scias pri la struktura variado inter la diversaj homaj lingvoj de la mondo. Pri tio vere temas la dua parto de lia artikolo, post la enkonduko, sed la tria temas pri “sociologiaj faktoroj”, kaj en tiu parto liaj konkludoj ofte ŝajnas baziĝi ne tiom sur empirio kaj fakaj scioj kiom sur supozoj kaj opinioj. Kompreneble Comrie, laborinta en diversaj landoj en diversaj kontinentoj, havas vastajn sciojn ankaŭ pri iliaj sociolingvistikaj cirkonstancoj, sed ĉi tie liaj konkludoj impresas multe pli supraĵe ol tiuj de sociolingvisto Tove Skutnabb-Kangas (2000: 280-284). Mi tamen suspektas, ke iuj miaj kolegoj-lingvistoj opinius tute male, pro la simpla kaŭzo, ke la pritakso pri Esperanto fare de Skutnabb-Kangas estas pozitiva...

Pri la du ofte asertataj avantaĝoj de Esperanto kompare kun la angla, facileco kaj neŭtraleco, Comrie konsideras ĉefe nur la neŭtralecon. Efektive li traktas facilecon nur preterpase priskribante la leksikon de Esperanto, kaj donas nenie sian tutecan pritakson de la temo. Estas neeble, ke li ne rimarkis la aserton de la esperantistoj pri la facileco de sia lingvo, ĉar li ja pritraktas kaj parte refutas kelkajn malpli oftajn asertojn iliajn, kiel tiun pri la struktura klareco kaj libereco de la Esperanta frazo. La sola klarigo, kiun mi povas elpensi, estas tiu relative komuna opinio en la moderna lingvoscienco, laŭ kiu ĉiuj lingvoj estas egale malsimplaj, sekve ili devas principe esti ankaŭ egale malfacilaj por lernado. Eble Comrie ne deziris tuŝi tiun dogmon – ĉar dogmo ĝi estas, ne empiria rezulto. Feliĉe oni lastatempe komencis iom post iom liberiĝi de tiu dogmo, sed estas interese rimarki, kiom da akraj rebatoj elvokis ekzemple la artikolo de McWhorter (2001) pri la simpleco de la kreolaj lingvoj.

Comrie dediĉas plej multe da atento al la asertita neŭtraleco de Esperanto. Sed li komencas per la pruvo, ke pro siaj eŭropa leksiko kaj eŭropeca gramatiko Esperanto ne estas strukture neŭtrala – li do konsideras la demandon unuavice el la vidpunkto de lingvo-rimedo, ne el tiu de lingvo-resurso. Estas vere, ke la esperantistoj ofte ne konscias pri la eŭropeca strukturo de sia lingvo, aŭ almenaŭ ne vidas problemon en ĝi, sed la argumento pri neŭtraleco ja neniam temis unuavice pri la strukturo de Esperanto, sed pri la potencorilato inter la denaskaj parolantoj kaj aliaj uzantoj de internacia lingvo. Comrie do parte misprezentas la argumenton, kiun li celas refuti.

Krome, celante pruvi, ke ankaŭ semantike, ne nur forme, la Esperantaj vortoj havas eŭropecan strukturon, li ŝajnas momente forgesi, pri kio temas lia artikolo: pri du kandidatoj de internacia lingvo. Li pravus en tio, ke la verbo *porti* havas ankaŭ la signifon ‘surhavi veston’ pro la influo de difinitaj eŭropaj lingvoj. Sed kiam li rimarkigas, ke estas same eŭropece havi nur unu ĝeneralan verbon *porti* ankaŭ en la ĉefa signifo de la vorto, dum ekzemple la korea lingvo havas apartajn verbojn por ‘porti surdorse’, ‘porti surmane’, ‘porti surbrake’ kaj aliaj, oni povas sin demandi, ĉu tia ĝenerala verbo kiel *porti* ne estas avantaĝo en internacia lingvo, kaj krome verŝajne ofta fenomeno ankaŭ en lingvoj ekstereŭropaj, se oni flankenlasas la korean. (Almenaŭ ĉe *meti*, ni scias, ke Zamenhof ja intence kreis verbon ĝeneralsencan por faciligi la lingvon.) Kaj, rilate la flankan signifon de *porti*, indas atentigi, ke ekzistas la sinonimo *surhavi*, verŝajne ankaŭ pli ofta nuntempe – Comrie ne uzis PIV-on, kaj tio bedaŭrinde videblas.

Comrie pritraktas la neŭtralecon de Esperanto fine ankaŭ el la vidpunkto de lingvo-resurso, sed ĝuste ĉi tie li laŭ mi glitas al la tereno de nuraj opinioj. Lia ĝenerala linio estas subtaksi la signifon de la ekonomiaj kaj politikaj faktoroj por la disvastiĝo de la angla kaj anstataŭe emfazi la toleremon de la denaskaj anglalingvanoj kontraŭ parolantoj nedenskaj. Laŭ li, unu el la kaŭzoj de la sukceso de la angla kiel internacia lingvo estas, ke ĝi toleras pli da variado ol ekzemple la pli strikte normigita franca, kaj ke ankaŭ nedenskuloj povas facile esti akceptataj kiel ĝiaj parolantoj. “La angla kiel internacia lingvo komencis en iuj rilatoj vivi sian propran vivon sendepende de tiu de la denaske anglalingvaj komunumoj” (p. 49,

mia traduko). Certagrade tio estas vera, la angla posedas tian socian facilecon – sed ne en la niveloj de pli postula lingvouzo. Al denaske anglalingvaj instruistoj kaj lingvokontrolantoj ne mankas laboro, male, ĝi multiĝas. Comrie iam favore recenzis anglalingvan libron mian – nun mi ŝatus demandi, ĉu li kredas, ke mi ne bezonis anglalingvan revizianton, aŭ ĉu li konsilus min ne plu uzi tian?

Indas ankaŭ atentigi, ke la “internacia angla” de la nedenaskaj parolantoj ne estas ia unueca fenomeno, sed en ĝi troviĝas eĉ pli da variado ol inter la diversaj normoj de la denaskaj parolantoj. Tiusence estas malfacile vidi, kiel ĝi eĉ principe povus “vivi sian memstaran vivon”. Nur la angla denaske parolata kunligas ĉiujn diversajn variaĵojn de la nedenaska angla.

Comrie meritas laŭdon pro la agnosko, ke al la lingvo Esperanto respondas lingva komunumo, kvankam ne en tradicia senco. Li tamen ne distingas la Esperanto-movadon kaj la Esperanto-komunumon. Tio laŭ mi estus sociologie grava kaj valida distingo, kvankam la du grandparte (sed neniel komplete) koincidas en la persona nivelo.

Comrie eĉ asertas, ke la angla estas nuntempe pli sendependa de sia lingvokomunumo ol Esperanto kaj tiel pli taŭga kiel internacia lingvo. Tio estas vera en la senco, ke por uzi la anglan kiel helplingvon ekzemple en intertraktado inter finno kaj japano, ne necesas alvoki denaskan parolanton nek pretendi, ke la diskuto okazas en angleca kultura medio laŭ la moroj de Anglalingvujo – dum Esperanton, male, estas malfacile uzi en iu ajn intertraktado, se oni ne pli-malpli aktive partoprenas en Esperantujo. Aliflanke, la denaska lingvokomunumo de la angla tamen plu ekzistas kaj difinas ĝiajn normojn kaj la prestiĝan lingvouzon. La menciitaj finno kaj la japano bonvenigus la helpon de denaska anglalingvano por redakti la finan dokumenton kaj la gazetaran komunikon de siaj traktadoj, dum en Esperantujo oni neniam kutimas alvoki denaskulon por tia tasko. Vole-nevole, malgraŭ sia principa deziro distanciĝi de sia anglalingva fono, Comrie kontribuas al la kamuflado de lingvaj potencrilatoj.

Sed kio do pri la eŭropeco de Esperanto? Ĉu la eŭropanoj posedas la resurson Esperanto pli multe ol ekzemple la azianoj? La eŭropan, eĉ okcident-eŭropan devenon de la morfemaro ne eblas nei, kaj multaj beletristoj de jardekoj celas eĉ senskrupule kreskigi la latinidan parton de la lingvo. Pri la gramatiko ne estas tiel simple diri. Certe ekzemple la relativaj subfrazoj, pri kiuj Comrie atentigas, estas en Esperanto tre eŭropecaj, tio estas, formataj laŭ strukturo, kiu oftas en Eŭropo sed estas pli rara inter ĉiuj lingvoj de la mondo. Ankaŭ la transitiva verbo *havi*, ne menciita de Comrie, estas tipe eŭropa lingverbo. Eblus tamen trovi almenaŭ kelkajn neeŭropajn gramatikaĵojn. Ekzemple, ŝajnas ke neniu eŭropa lingvo, kiu havas futuran tenseon, regule aŭ devige uzas ĝin en la frazotipo “morgaŭ estos merkredo” kiel Esperanto.

La barata lingvisto Probal Daŝgupto klarigis al mi en personaj mesaĝoj la pensadon de iuj aziaj esperantistoj pri tiu temo: La eŭropa kulturo restas kiel fruktodona aluvio en la pli multaj landoj ekstereŭropaj, tiusence la eŭropeco de Esperanto ne estas nur malavantaĝo. (Kiel Comrie atentigas, eŭropeco neniel malhelpis la anglan en ties nuna internacia rolo.) Sed, diras Daŝgupto kaj kelkaj japanaj esperantistoj, pere de Esperanto ekzemple la azianoj povas “uzi la objektan Eŭropon” kaj “marĝenigi la subjektan potencon de Eŭropo”. En mia terminologio, ili povas partopreni en la posedo kaj renovigo de eŭropa lingvo-resurso.

Certasence tiu ebleco de “objektigita Eŭropo” ekzistis miaopinie en Esperanto ekde la komenco. Ĝi ne estis latinideca helplingvo kreita de franco aŭ italo, sed latinideca kontaktolingvo kreita de orienteŭropa judo kun ĉefe slava lingva fono (Lindstedt, aperonta). Sekve la radikoj, kvankam laŭaspekte latinidaj, ekde la komenco devis subiĝi ankaŭ al slaveca sintakso, foje ankaŭ al slavecaj signifokampoj – tiaj vortoj kiel *vico* aŭ *okazo* estas

plu rusismoj laŭ siaj sencoj, malgraŭ la misgvide okcidenta vesto. La Ido-krizo estiĝis pro la nesukcesa provo de kelkaj francoj tiri la tutan lingvon al la okcidenta flanko.

Oni devas ankaŭ eviti tro hastajn konkludojn pri tio, kio estas eŭropeca kaj kio ne. Por uzi la ekzemplon de Daŝgupto: Unuavide la nomo *haŝioj* por *manĝbastonetoj* ŝajnas taŭga japanismo por pliinternaciigi la lingvon. Sed kial la japanoj rajtus trudi sian vorton al la ceteraj popoloj de Orienta Azio, same uzantaj manĝbastonetojn? Montriĝas, ke ankaŭ por azianoj *manĝbastonetoj* estas la internacie plej neŭtrala vorto, malgraŭ la eŭropa deveno de *manĝ-*, *-baston-* kaj *-et-*.

## 5 Trans rimedo kaj resurso

Fine ni devas agnoski la nekompletecon de nia analizo. La tradiciaj argumentoj por Esperanto estas ĝiaj facileco kaj neŭtraleco – kaj evidentiĝis, ke tiuj rilatas respektive al lingvo kiel rimedo kaj lingvo kiel resurso: Esperanto estas rimedo facile alproprigebla, sed neniu grupo de homoj posedas ĝin, kiel resurson, pli multe ol aliaj. Tamen, la facileco ne multe pezas, se oni konsideras la praktikan aplikeblon en la nuna mondo. Ĉiuj konsentas, ke biciklo estas pli malmultekosta ol aŭto, sed por longa vojaĝo oni tamen preferas aŭton. Kaj, aliflanke, ankaŭ la angla estas tre ofte neŭtrala komunikilo en la nuna mondo – inter germano kaj koreo, ekzemple. Ke nek la germano nek la koreo kapablas verki poemojn en la angla, ne ĝenas ilin en granda plimulto de la kazoj.

Sed troviĝas ankaŭ tria motivo okupiĝi pri Esperanto – “interna ideo”, oni tradicie diras, sed por ne bezoni difini ĝin (kaj krevigi ĉi tiun eseon), lasu min konvencie paroli nur pri la “tria motivo”. Tion mi rekomprenis dum la Universala Kongreso en Gotenburgo, kiam miaj tri gefiloj, aĝe inter tri kaj ok jaroj, ludis Esperante kun la itala korespond-amikino de la plej aĝa. Ili ŝatis ludi, sed ili ankaŭ komprenis la valoron de la lingva komunikilo, kiu ilin kunigis. Ili eĉ, sen ia ajn modelo en nia familio aŭ en la responda itala, memstare reinventis verdstelanismon: ili faris Esperanto-flagojn el papero kaj bastonetoj por kunporti en la parkon, kaj skribis Esperanto-reklamojn sur la sablo de parkaj promenejoj, tiel fervore ke mi, sinĝena, ne povis decidi, ĉu malpermesi al ili aŭ ne.

Estas klare, ke iusence Comrie montriĝas prava pri la komunumo: tiuj Esperant-lingvaj infanoj jam komencis senti sin anoj de la sama homgrupo. Tio tamen ne baziĝas sole sur komuna lingvo, sed ankaŭ sur komunaj valoroj – sur la deziro de la infanoj kaj iliaj gepatroj superi kelkajn lingvaj, etnaj kaj kulturajn limojn. Ĝuste *tio* faras Esperanton malsimila. Ankaŭ tio estas resurso, sed resurso por spirita kresko kaj alternativa mondo.

## Bibliografio

- Comrie, Bernard (1996): “Natural and artificial international languages: A typo[logist’s assessment”. En: *Journal of Universal Language* 3, majo 1996, p. 35–55.
- Corsetti, Renato (1996): “A mother tongue spoken mainly by fathers”. En: *Language Problems and Language Planning* 20/3, p. 263–273.
- Crystal, David (1997): *English as a Global Language*. Cambridge: Cambridge University Press.
- (2000): *Language Death*. Cambridge: Cambridge University Press.
- Graddol, David (1997): *The Future of English? A Guide to Forecasting the Popularity of the English Language in the 21st Century*. London: British Council.
- (2006): *English Next. Why global English may mean the end of ‘English as a Foreign Language’*. London: British Council. <http://www.britishcouncil.org/learning-research-english-next.pdf>.
- Ivanov, Slavik (2004): “Slavik Ivanov volas ke UEA estu pli travidebla” (intervjuo). En la reta gazeto *Libera Folio* <<http://www.liberafolio.org>>, la teksto aperis 13.4.2004.
- Lindstedt, Jouko (aperonta): “Esperanto – an East European contact language?” En la kongresvolumo *Die Slawizität Europas* (aperonta en la serio Berliner slawistische Arbeiten).

- McWhorter, John H. (2001): "The world's simplest grammars are creole grammars". En: *Linguistic Typology* 5/2-3, p. 125-166. (Vd. ankaŭ la komentajn artikolojn en la sama numero.)
- Phillipson, Robert (2004): *Ĉu nur-angla Eŭropo? Defio al lingva politiko*. Rotterdam: UEA. (Traduko de *English-only Europe? Challenging language policy* de István Ertl. London, New York: Routledge 2003.)
- Piron, Claude (1994): *Le défi des langues. Du gâchis au bon sens*. Paris: L'Harmattan.
- Ruiz, Richard (1984). "Orientations in language planning". *NABE Journal* 8/2, p. 15-34. (Citita laŭ Skutnabb-Kangas 2000, p. 610.)
- Skutnabb-Kangas, Tove (2000): *Linguistic Genocide in Education – or Worldwide Diversity and Human Rights?* Mahwah, New Jersey; London: Lawrence Erlbaum.
- Tonkin, Humphrey (2006): *Lingvo kaj popolo. Aktualaj problemoj de la Esperanto-movado*. Rotterdam: UEA.
- Zamenhof, L.L. [1910] (1974): *Proverbaro Esperanta*. La Laguna: J. Régulo (Stafeto. Beletraj Kajeroj, 10).
- (1990): *Ĝis la homaranismo 1896-1906*. Red. Ludovikito. Kioto: Ludovikito. (Plena verkaro. Originalaro, 2).
- [1903] (1992): *Fundamenta Krestomatio de la lingvo Esperanto*. 18-a eldono. Red. G. Waringhien. Roterdamo: UEA.

### Listo de la cititaj beletraj verkoj

- Declerck, Christian (2002): *Tarokoj kaj epokoj*. Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo.
- Johansson, Sten (2001): *Dis!* Antverpeno: Flandra Esperanto-Ligo.
- Mährti, Paula (pseŭdonimo, 1997): *La manto*. Chapecó: Fonto.
- Píĉ, Karolo (1989): *La Litomiŝla tombejo*. Dua, korektita eldono. Saarbrücken: Iltis.
- Štimec, Spomenka (1996): *Ombro sur interna pejzaĝo*. Dua eldono. Pisa: Edistudio.
- Urbanová, Eli (1995): *Hetajro danças*. Chapecó: Fonto.

---

### Jouko Lindstedt

Nask. 1955. Doktoro pri filozofio, profesoro pri slava filologio en la Universitato de Helsinko, membro de la Akademio de Esperanto kaj prezidanto de Fondumo Esperanto. Verkis *On the semantics of tense and aspect in Bulgarian* (1985); *Hejma Vortaro: Vortareto de hejmaĵoj en Esperanto* (1999); *The Konikovo Gospel* (ĉefred., 2008).

---